

Theodor Storm,
Rigora lumo eniĝas

tradukita de Manfredo Ratislavo

Post la morto de lia unua edzino Konstanco ekkaptis la poeton teruro antaŭ „tiu eterna dezerta estonteco“, vi-dalvide de ammalplena, senfeliĉa ekzistado, pri kiu ne-niu kredo je rekuniĝo en la transo povas konsoli. Lapide kaj dure, ne uzante la de li alitempe preferata kantfor-mo, la poeto parolas pri tiu nova sperto:

Sed, rigora lumo eniĝas;
Kaj antaŭ mi ĝi etendiĝas,
Dezerte, plena da teruro kaj soleco;
Tie, fore, mi antaŭsentas la abismon;
En ĝi la nenion. –

Sed pluen kaj pluen
Trenas mi min
De tago al tag',
De monat' al monat',
De jaro al jar';
Ĝis mi fine
Elherpita je l' vivo kaj sen espero
Falos suben ĉevoje
Kaj la malnova, eterna nokto
kovros min komplete,
kune kun ĉiuj revoj kaj sopiroj.

*Traduko de la Germana poemo “Unerbittliches Licht dringt herein” de THEODOR STORM (Teodoro Stormo, *1817-09-14 – †1888-07-04) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2002-04-14.*

MR-395-1b / Arg-198-393 (2004-03-05 23:04:27)

La germana-lingva originalo de tiu ĉi poemo estas presita en la libro „Theodor Storm“ de Regina Fasold, el la serio Bild-Biographie, eldonita de la eldonejo VEB Bibliographisches Institut Leipzig, en 1990, ISBN 3-323-00196-6. El tiu libro estas prenita ankaŭ la supra klariga teksto.